

Carl Riedel,
Aŭdu, paŝtistoj

*tradukita de Albrecht Kro-
nenberger*

Aŭdu, paŝtisto,
mi diras al vi
Bonan sciigon
pri l' Filo de Di':
Enkarniĝinta,
ĵus naskiĝinta,
Ĉirkaŭvindita,
entrogigita.
Gloron al Li!

Vidu, homidoj,
la amon de Di'.
Malsupreniris
la Vorto por vi.
Kruce murdota,
entombigota,
Resurektonta,
ĉiel-ironta.
Gloron al Li!

Venu, kristanoj,
rapidu al Li,
Kiu bebiĝis
en stalo por vi.
Miru ĝojante,
kore kantante,
Genufleksante,
Lin adorante.
Gloron al Li!

...

Carl Riedel,
Venu, paŝtistoj

*tradukita de Manfredo Ra-
tislavo*

Venu, paŝtistoj,
Vi homoj al ni!
Venu kaj vidu
La filon de Di'!
Kristo hodiaŭ
Por vi naskiĝis,
Via Savanto
Li elektiĝis.
|: Ne timu vi! :|

Venu rigardi
Vi tion kun ni,
Kion promesis
Ĉiel-melodi'!
Kion vi trovos.
Ni diskonigu,
Kaj la Sinjoron
Ni honorigu!
|: Haleluja! :|

Estas ĝojego
Por la paŝtistar',
La sciigaĵo
De la anĝelar':
Inter la homoj
Nun iĝu paco
Kaj sur la tero
La Dia graco.
|: Al Di' honor! :|

...

Carl Riedel,
Kommet, ihr Hirten

Kommet, ihr Hirten,
Ihr Männer und Fraun!
Kommet, das liebliche
Kindlein zu schau!
Christus, der Herr,
Ist heute geboren,
Den Gott zum Heiland
Euch hat erkoren.
|: Fürchtet euch nicht! :|

Lasset uns sehen
In Bethlehems Stall,
Was uns verheißen
Der himmlische Schall!
Was wir dort finden,
Lasset uns künden,
Lasset uns preisen
In frommen Weisen.
|: Allelujah! :|

Wahrlich, die Engel
Verkündigen heut
Bethlehems Hirtenvolk
Gar große Freud:
Nun soll es werden
Frieden auf Erden,
Den Menschen allen
Ein Wohlgefallen.
|: Ehre sei Gott! :|

...

Traduko de la Germana poemo “Kommet, ihr Hirten” de CARL RIEDEL (*1827-10.05 – †1888-06-03) en Esperanton de ALBRECHT KRONENBERGER (*1940-01-21) en 1990.

Arg-565-1142 (2010-09-20 11:11:28)

Tiu ĉi traduko troviĝas en la retejo <http://reocities.com/cigneto/thctxt/a/auxdupasx1.html>.

Traduko de la Germana poemo “Kommet, ihr Hirten” de CARL RIEDEL (*1827-10.05 – †1888-06-03) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff; Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, *1938-11-04) en 1982.

MR-014-3 / Arg-565-1140 (2010-09-20 10:01:32)

La muziknotojn vidu jen: http://www.lieder-archiv.de/lieder/show_song.php?ix=200038.

Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas CARL RIEDEL (*1827-10.05 – †1888-06-03).

Arg-565-1139 (2012-12-26 14:08:58)

Vidu ankaŭ la retejon <http://ingeb.org/spiritua/kommetih.html> kaj la muziknotojn jen: http://www.lieder-archiv.de/lieder/show_song.php?ix=200038. Aŭdeblas la melodio jen: <http://ingeb.org/Lieder/kommetih.mid>. Vidu ankaŭ: http://www.lieder-archiv.de/kommet_ihr_hirten-notenblatt_200038.html.